TUTŜTATA KONSULTA KOLEGIO ESPERANTISTA en ĈEĤOSLOVAKA RESPUBLIKO

Celostátní esperantský poradní sbor republiky československé

---

Olomouc, dato de poŝtstampilo

Karaj samideanoj, estimataj amikoj,

Presidanto de TKKE s-ano Josef Vítek ricevis el ministerio de lernejaferoj kaj kulturo leteron datitan la 19. IX. 1956, kiu enhavis jenan tekston:

"Estimata kamarado, ĉar montriĝis, ke pritraktado de la propono por principa solvo de la problemoj de Esperanto-movado en kompetentaj organoj daŭros pli longtempe ol oni supozis, mi postulas vin, ke vi aranĝu prokraston de la konferenco de Esperantistoj kunvokita per Tutŝtata konsulta kolegio Esperantista en urbon Olomouc. Ĝian daton ni interkonsentos post eldono de la principa decido. Mi petas vin, ke vi afable prizorgu ke ĉiuj invititaj estu informitaj pri la prokrasto de dato de la konferenco. Subskribita estas gvidanto de sekcio por klerigaj institutoj kaj klerigaj lernejoj Ant. Richter.

Kvankam la organizaj laboroj kaj preparo de la konferenco jam plene disvolviĝis, obeis TKKE post antaŭa pritraktado la deziron de ministerio por lernejaferoj kaj kulturo kaj decidiĝis prokrasti la konferencon el la 20. kaj 21.X.1956 je pli posta dato, kiu estos destinita en interkonsento kun apartenantaj organoj post solvo de principaj problemoj koncernantaj la Esperanto-movadon.

Ni petas ĉiujn samideanojn, kiuj aliĝis al la konferenco, ke ili afable akceptu sciigon pri tiu ĉi ŝanĝo kaj ni certigas ilinp ke TKKE faros ĉion, por ke la tutŝtata konfereneo efektiviĝu en la tempo plej proksima kaj ke ĝi alportu la finan solvon de Esperanto-movado en nia patrujo.

Al tiuj, kiuj tamen kaŭze de prokrasto de la konferenco skribe nuligos siajn aliĝilojn, estos resenditaj la antaŭpagoj post subtraho de poŝtelspezoj.

Ĝis la 30.IX.1956 aliĝis al la konferenco 672 delegitoj el ĈSR kaj eksterlandaj gastoj el USSR, Ĉinio, Pollando, Hungario, Bulgario, Rumanio, Jugoslavio, Germana dem. respubliko, Aŭstrio, Vietnamo, Nederlando kaj Svedio.

Por TKKE – ĈSR:

Josef V í t e k presidanto

Miloš R u d o l f sekretario

Předseda TKKE s. Josef Vítek obdržel z ministerstva školství a kultury dopis, datovaný dnem 19.IX.195,a tohoto znění:

"Vážený soudruhu, protoze se ukázalo, že projednavání návrhu na zásadní rešení otázek esperantského hnutí v příslušných orgánech potrvá pravděpodobně déle, než se předpokládalo, žádám vás, abyste zařídil, aby konference esperantistů svolaná Celostátním esperantským poradním sborem do Olomouce, byla odložena na neurčito. Její termín dohodneme po vydání zásadního rozhodnutí. Prosim Vás, abyste laskavě zařídil, aby o odložení termínu konference byli uvědoměni všichni pozvaní. Podepsán vedoucí oddělení osvětových škol Ant. Richter.

Ačkoliv organisační práce a příprava konference byly již v plném proudu, podřidil se TKKE po předchozím jednání přání ministerstva školství a kultury a rozhodl se přeložiti termín celostátní konference z 20. a 21. X. 1956 na termin pozdější, který bude určen po dohodě s příslušnými orgány po vyřešení zásadních otázek týkajících se esperantskeho hnutí.

Prosíme všechnv samideány, kteří se na konferenci přihlásili, aby tuto změnu vzali laskavě na vědomí a ujišťujeme je, že TKKE učiní vše, aby celostátní konference se uskutečnila v době co nejbližší a aby přinesla konečné řešení otázky esperantského hnutí v naší vlasti.

Tem, kdo přesto v důsledku odložení konference písemně oznámí zrušení své přihlášky, budou vráceny zálohy po odečtení poštovného.

Ke dni 30.IX.1956 bylo na konferenci přihlášeno 672 delegatů z ČSR a zahraniční hosté z SSSR, Číny, Polska, Maďarska, Bulharska, Rumunska, Jugoslávie, Německé dem. republiky, Rakouska, Vietnamu, Holandska a Švédska.

Por LKK - Olomouc:

Jaroslav Karhan, Dr. Vladimír Mohapl